

AKVO / ACQUA



## ENHAVO / INDICE



## Alvoko al la vivantoj / Appello ai viventi (dispari)



*'I 'nhw tpw t3, swt(y).sn hr is pn sqbt n(.i) mw, ink hr(y) sšt3, pr n(.i) prt-hrw t hnqt  
m ntt mht.tn ink mry rmt.*

Spesso scritto sul muro esterno della cappella (qui è come si rileva nella tomba di Nedjemib (V dinastia, regno di Dedkara Isesi) a beneficio dei viventi, il testo che presentiamo (una frase rituale il defunto si rivolgeva direttamente ai passanti e chiedeva loro di compiere i riti per poter rivivere nell'aldilà) mostra il valore simbolico dell'acqua nell'antico mondo egiziano, che, legandola al simbolismo femminile, ne vede l'elemento primordiale che ha generato tutte le cose viventi.

Ofte skribita teksto sur la ekstera muro de kapelo (ĉi tie estas la teksto en la tombo de Nedjemib (5a dinastio, regno de Dedkara Isesi) favore al la vivantoj. La teksto, kiun ni prezentas (rita frazo per kiu la mortinto alparolis rekte la pasantojn kaj petis ilin plenumi la ritojn por povi ree vivi en la transmondo), montras la simblan valoron de akvo en la antikva egipta mondo, kiu, ligante ĝin al la ina simbolaro, vidas ĝian praelemento, kiu generis ĉiujn vivantajn aĵojn.

'O viventi sulla terra, che  
passerete presso questa tomba  
fate versare l'acqua per me  
poiché io ero un preposto ai  
segreti! Esca per me l'offerta  
funeraria di pane e birra che è  
presso di voi poiché io ero un  
amato dalla gente'

'Ho vivantoj en la mondo, kiuj  
pasos ĉe ĉi tiu tombo, verŝigu  
akvon por mi, ĉar mi estis  
respondeculo pri sekretoj. Eliru  
por mi la funebra ofero de pano  
kaj biero, kiu estas ĉe vi, ĉar mi  
estis amata de la popolo'

*enūma eliš* (pari)



Nelle Sette Tavole dell'*enūma eliš* che testimoniano la tradizione asiro-babilonese della creazione si narra di come, da una massa confusa e disordinata di materiale acquatico iniziale, si stabilizza l'ordine della coppia Apsu – Tiamat: il primo, personificazione maschile delle acque sotterranee dolci e fresche; la seconda, personificazione femminile dell'acqua salata e amara (l'accadico *tiamat* significa anche 'mare'). Si propongono qui le prime suggestive righe del poema.

En la Sep Tabuloj de *enūma eliš*, kiuj atestas la asiran-babilonan tradicion de kreado, oni rakontas kiel de miksita kaj senorda amaso de komenca akva pra-materialo, stabiĝas la ordo de la paro Apsu-Tiamat: la unua estas persona vira reprezentanto de la subteraj dolĉaj kaj malvarmetaj akvoj; la dua estas persona ina reprezentantino de la sala kaj maldolĉa akvo (la akada *tiamat* signifas ankaŭ 'maron'). Ĉi tie ni proponas la unuajn elvokajn liniojn de la poemo.


*enūma eliš lā nabû šamāmū  
šapliš ammatum ŝuma lā zakrat  
Apsū mā rēštū zārūšun  
mummu Tiāmat mu(w)allidat gimrīšun  
mûšunu ištēniš ihīqūma  
gipāra lā kišsurū ŝūšā lā še'û  
enūma ilāni lā šūpû manāma  
ŝuma lā zukkuru ŝīmātu lā ŝīmu  
ibbanūma ilāni qerebšun  
Laḥmu Laḥāmu uštāpû ŝumī izzakrū  
Adi irbū išīhū*



## Enûma Elish

Series of tablets of creation


Part of the tablet N° 1




Kiam el la alto la Ĉielo jam ne havis nomon  
Kaj la tero, sube, jam ne estis nomata per ĝia nomo,  
Nenio ekzistis krom Apsû, la antikvulo, ilia kreinto,  
Kaj Mummu kaj Tiāmat, la patrino de ili ĉiuj,  
Iliak akvoj miksiĝis kune,  
Kaj nek herbejoj jam formiĝis, nek kanejoj jam ekzistis;  
Kiam neniu el la dioj ne jam sin manifestis.  
Neniu havis nomon kaj iliaj destinoj estis necertaj  
Tiam, meze de ili, kaptis formon la dioj.

Quando in alto il Cielo non aveva ancora un nome,  
E in basso la Terra non era ancora chiamata con il suo nome,  
e Apsu, il primo,  
Apsu l'antico, il loro creatore,  
E la creatrice Tiamat, che li aveva partoriti tutti,  
mescolarono insieme le loro acque  
i prati non erano ancora formati, né creati i canneti;  
Quando nessuno degli Dei ancora era manifesto.  
i loro nomi non pronunciati, non decretati i loro destini.  
Allora in Apsu-Tiamat alcuni Dei furono creati.  
Lahmu e Lahamu vennero all'esistenza,  
i loro nomi furono detti


## CHEVRON

Secondo gli studi di Marija Gimbutas, le antiche iconografie preistoriche europee e del mondo intero documenterebbero la resa dell'acqua con elementi a *zig-zag* o con motivi ad *S*. Il motivo a *zig-zag*, fra i più antichi simboli documentati, si alterna con il segno *M*, una sorta di *zig-zag* abbreviato. In Europa, dal periodo Magdaleniano, *zig-zag* e *M* sono incisi e dipinti in forme uterine e lenticolari (vulva) suggerendo così l'affinità simbolica tra *zig-zag*, *M*, umidità femminile e liquido amniotico. Non è improbabile che il significato primariamente acquatico del segno *M* sia sopravvissuto nel geroglifico egiziano  *mu* 'acqua'.

Vazo venanta el sud-orienta Hungarujo dekoraciita per elementoj kunligeblaj al la simbolaro de la akvo-mondo: meandroj, larĝaj zonoj de daŭraj spiraloj, paralelaj linioj segmentitaj kaj ŝahtabulaj




Vaso proveniente dall'Ungheria sud orientale decorato con elementi riconducibili al simbolismo del mondo acquatico: meandri, larghe fasce di spirali continue, linee parallele segmentate e decorazioni a scacchiera.



Ekzemploj de "V-forma dekorajo". Ceramikaĵoj venanta el nord-kaj sud-orienta Hungarujo kaj el Germanujo.

Esempi di "chevron a due spioventi".

Ceramica proveniente dall'Ungheria nord e sud orientale e dalla Germania


Laŭ la studoj de Marija Gimbutas la antikvaj prahistoriaj bildoj eŭropaj kaj tutmondaj eble donas pruvojn pri la prezento de akvo per elementoj *zigzagaj* aŭ per signoj en formo de *S*. La formoj *zigzagaj*, inter la plej antikvaj trovitaj simboloj, alterniĝas kun la signo *M*, speco de *zigzago* mallongigita. En Eŭropo de la Magdalena periodo, *zigzagoj* kaj *M-oj* estas gravuritaj kaj pentritaj in formoj uteraj kaj lensaj (vulvo). Tio tiel sugestas la simolan similecon inter *zigzago*, *M*, virina humideco kaj amnia likvaĵo. Ne estas malverŝajne, ke la signifo ĉefe akva de la signo *M* pretervivis en la egipta skribosigno  *mu* 'akvo'.



## La diluvo / Il diluvio (dispari)

Il diluvio è un motivo presente nella tradizione orale e scritta in molte culture, dalla mitologia sumera (dove è inteso come l'evento sacro che divide il tempo in ante-diluviale e post-diluviale), a quello narrato nell'Epopea del Gilgamesh (dove si narra del vecchio saggio Utnapishtim, scelto dal dio Ea per ricostruire l'umanità dopo il diluvio mandato sulla terra per punire la malvagità umana), alla mitologia maya (per la quale le quattro ere del mondo vissute da quattro diverse umanità sono distinte proprio da tre diluvi), fino alla tradizione letteraria greca, che presenta invece il mito di Deucalione e Pirra, unici superstiti di un diluvio universale mandato da Zeus per punire la cattiveria degli uomini. La celebre pagina dalla tradizione ebraica (*Gen. 7,6-8,14*) è qui resa in esperanto dalla versione dello stesso L.L. Zamenhof.

La inundo estas koncepto apartenanta al la voĉa kaj skriba tradicioj de multaj kulturoj, de la sumera mitaro (kie oni komprenas ĝin kiel kiel la sanktan eventon, kiu dividas la tempon en antaŭ- kaj post-inunda) al tio, kion oni rankontas en la Eposo de Gilgameŝ (kie oni rakontas pri la maljuna saĝulo Utnapishtim, elektita de la dio Ea por rekonstrui la mondon post la inundo sendita por puni la homan malicon), al la maja mitaro (en kiu la kvar epokoj de la mondo vivitaj de kvar malsamaj homaroj estas dividitaj de tri inundoj) ĝis la greka literatura tradicio, kiu proponas la miton de Deucalione kaj Pirra, solaj pretervivintoj de monda inundo sendita de Jupitero por puni la malicon de la homoj. La tre fama paĝo de la juda tradicio (*Gen. 7,6-8,14*) estas ĉi tie prezentata en Esperanto en la traduko de L.L. Zamenhof mem.



## Genezo 7

<sup>6</sup>Kaj Noa havis la aĝon de sescent jaroj, kiam la akva diluvo venis sur la teron. <sup>7</sup>Kaj eniris Noa kaj liaj filoj kaj lia edzino kaj la edzinoj de liaj filoj kune kun li en la arkeon, pro la akvo de la diluvo. <sup>8</sup>El la brutoj puraj, kaj el la brutoj, kiuj ne estas puraj, kaj el la birdoj, kaj el ĉiuj rampaĵoj sur la tero, <sup>9</sup>po unu paro venis al Noa en la arkeon, virbesto kaj ino, kiel Dio ordonis al Noa. <sup>10</sup>Kaj kiam pasis la sep tagoj, la diluva akvo venis sur la teron. <sup>11</sup>En la sescenta jaro de la vivo de Noa, en la dua monato, en la dek-sepa tago de la monato, en tiu tago disfendiĝis ĉiuj fontoj de la granda abismo kaj la aperturoj de la ĉielo malfermiĝis. <sup>12</sup>Kaj estis pluvo sur la tero dum kvardek tagoj kaj kvardek noktoj. <sup>13</sup>Ĝuste en tiu tago eniris en la arkeon Noa, kaj Ŝem kaj Ĥam kaj Jafet, la filoj de Noa, kaj la edzino de Noa, kaj la tri edzinoj de liaj filoj kune kun ili; <sup>14</sup>ili, kaj ĉiuj bestoj laŭ siaj specoj, kaj ĉiuj brutoj laŭ siaj specoj, kaj ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero, laŭ siaj specoj, kaj ĉiuj flugaĵoj laŭ siaj specoj, ĉiuj birdoj, ĉiuj flugilhavantoj. <sup>15</sup>Kaj eniris al Noa en la arkeon po du el ĉiu karno, kiu havas en si spiriton de vivo. <sup>16</sup>Kaj la venintoj, virbesto kaj ino el ĉiu karno, eniris, kiel ordonis al ili Dio; kaj la Eternulo fermis post ili. <sup>17</sup>Kaj estis diluvo dum kvardek tagoj sur la tero; kaj multiĝis la akvo kaj levis la arkeon, kaj ĝi estis alte super la tero. <sup>18</sup>Kaj la akvo fortiĝis sur la tero, kaj la arkeo naĝis sur la supraĵo de la akvo. <sup>19</sup>Kaj la akvo treege fortiĝis kaj tre multiĝis sur la tero; kaj kovriĝis ĉiuj altaj montoj, kiuj estas sub la ĉielo. <sup>20</sup>Dek kvin ulnojn pli alte leviĝis la akvo kaj kovris la montojn. <sup>21</sup>Kaj pereis ĉiu karno, kiu moviĝas sur la tero, la birdoj kaj la brutoj kaj la bestoj, kaj ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero, kaj ĉiuj homoj. <sup>22</sup>Ĉio, kio havis en si spiriton de vivo, el ĉio, kio estis sur la seka tero, mortis. <sup>23</sup>Kaj ekstermiĝis ĉiuj ekzistaĵoj, kiuj estis sur la tero, de homo ĝis brutoj kaj rampaĵoj kaj birdoj de la ĉielo; ili ekstermiĝis de sur la tero; kaj restis nur Noa kaj kio estis kun li en la arkeo. <sup>24</sup>Kaj la akvo okupis la teron dum cent kvindek tagoj.

## Genesi 7

<sup>6</sup>Noè aveva seicento anni, quando venne il diluvio, cioè le acque sulla terra. <sup>7</sup>Noè entrò nell'arca e con lui i suoi figli, sua moglie e le mogli dei suoi figli, per sottrarsi alle acque del diluvio. <sup>8</sup>Degli animali mondi e di quelli immondi, degli uccelli e di tutti gli esseri che strisciano sul suolo <sup>9</sup>entrarono a due a due con Noè nell'arca, maschio e femmina, come Dio aveva comandato a Noè. <sup>10</sup>Dopo sette giorni, le acque del diluvio furono sopra la terra; <sup>11</sup>nell'anno seicentesimo della vita di Noè, nel secondo mese, il diciassette del mese, proprio in quello stesso giorno, eruppero tutte le sorgenti del grande abisso e le cateratte del cielo si aprirono. <sup>12</sup>Cadde la pioggia sulla terra per quaranta giorni e quaranta notti. <sup>13</sup>In quello stesso giorno entrò nell'arca Noè con i figli Sem, Cam e Iafet, la moglie di Noè, le tre mogli dei suoi tre figli: <sup>14</sup>essi e tutti i viventi secondo la loro specie e tutto il bestiame secondo la sua specie e tutti i rettili che strisciano sulla terra secondo la loro specie, tutti i volatili secondo la loro specie, tutti gli uccelli, tutti gli esseri alati. <sup>15</sup>Vennero dunque a Noè nell'arca, a due a due, di ogni carne in cui è il soffio di vita. <sup>16</sup>Quelli che venivano, maschio e femmina d'ogni carne, entrarono come gli aveva comandato Dio: il Signore chiuse la porta dietro di lui. <sup>17</sup>Il diluvio durò sulla terra quaranta giorni: le acque crebbero e sollevarono l'arca che si innalzò sulla terra. <sup>18</sup>Le acque divennero poderose e crebbero molto sopra la terra e l'arca galleggiava sulle acque. <sup>19</sup>Le acque si innalzarono sempre più sopra la terra e coprirono tutti i monti più alti che sono sotto tutto il cielo. <sup>20</sup>Le acque superarono in altezza di quindici cubiti i monti che avevano ricoperto. <sup>21</sup>Però ogni essere vivente che si muove sulla terra, uccelli, bestiame e fiere e tutti gli esseri che brulicano sulla terra e tutti gli uomini. <sup>22</sup>Ogni essere che ha un alito di vita nelle narici, cioè quanto era sulla terra asciutta morì. <sup>23</sup>Così fu sterminato ogni essere che era sulla terra: con gli uomini, gli animali domestici, i rettili e gli uccelli del cielo; essi furono sterminati dalla terra e rimase solo Noè e chi stava con lui nell'arca. <sup>24</sup>Le acque restarono alte sopra la terra centocinquanta giorni.

## Genezo 8

<sup>1</sup>Kaj Dio rememoris Noan, kaj ĉiujn bestojn kaj ĉiujn brutojn, kiuj estis kun li en la arkeo; kaj Dio venigis venton sur la teron, kaj la akvo kvietiĝis. <sup>2</sup>Kaj fermiĝis la fontoj de la abismo kaj la aperturoj de la ĉielo, kaj ĉesiĝis la pluvo el la ĉielo. <sup>3</sup>Kaj iom post iom reforiĝis la akvo de sur la tero, kaj la akvo komencis malmultiĝi post la paso de cent kvindek tagoj. <sup>4</sup>Kaj la arkeo haltis en la sepa monato, en la dek-sepa tago de la monato, sur la montoj Ararat. <sup>5</sup>Kaj la akvo konstante malpliĝadis ĝis la deka monato; en la unua tago de la deka monato montriĝis la suproj de la montoj. <sup>6</sup>Kaj post kvardek tagoj Noa malfermis la fenestron de la arkeo, kiun li faris. <sup>7</sup>Kaj li ellasis korvon, kaj ĝi elflugis, forflugadis kaj revenadis, ĝis forsekiĝis la akvo sur la tero. <sup>8</sup>Kaj li ellasis de si kolombon, por vidi, ĉu jam malfortiĝis la akvo sur la tero. <sup>9</sup>Sed la kolombo ne trovis ripozejon por siaj piedoj, kaj ĝi revenis al li en la arkeon, ĉar akvo estis sur la supraĵo de la tuta tero. Kaj li etendis sian manon kaj prenis la kolombon kaj envenigis ĝin al si en la arkeon. <sup>10</sup>Kaj li atendis ankoraŭ aliajn sep tagojn, kaj li denove ellasis la kolombon el la arkeo. <sup>11</sup>Kaj revenis al li la kolombo en tempo vespera, kaj jen ĝi havis en sia buŝo deŝiritan folion de olivarbo; kaj Noa konvinkiĝis, ke la akvo malfortiĝis sur la tero. <sup>12</sup>Kaj li atendis ankoraŭ aliajn sep tagojn, kaj li ellasis la kolombon, kaj ĉi tiu jam ne plu revenis al li. <sup>13</sup>Kaj en la sescent-unua jaro, en la unua tago de la unua monato, forsekiĝis la akvo sur la tero; kaj Noa malfermis la tegmenton de la arkeo, kaj li vidis, ke sekiĝis la supraĵo de la tero. <sup>14</sup>Kaj en la dua monato, en la dudek-sepa tago de la monato, la tero elsekiĝis.

## Genesi 8

<sup>1</sup>Dio si ricordò di Noè, di tutte le fiere e di tutti gli animali domestici che erano con lui nell'arca. Dio fece passare un vento sulla terra e le acque si abbassarono. <sup>2</sup>Le fonti dell'abisso e le cateratte del cielo furono chiuse e fu trattenuta la pioggia dal cielo; <sup>3</sup>le acque andarono via via ritirandosi dalla terra e calarono dopo centocinquanta giorni. <sup>4</sup>Nel settimo mese, il diciassette del mese, l'arca si posò sui monti dell'Ararat. <sup>5</sup>Le acque andarono via via diminuendo fino al decimo mese. Nel decimo mese, il primo giorno del mese, apparvero le cime dei monti. <sup>6</sup>Trascorsi quaranta giorni, Noè aprì la finestra che aveva fatta nell'arca e fece uscire un corvo per vedere se le acque si fossero ritirate. <sup>7</sup>Esso uscì andando e tornando finché si prosciugarono le acque sulla terra. <sup>8</sup>Noè poi fece uscire una colomba, per vedere se le acque si fossero ritirate dal suolo; <sup>9</sup>ma la colomba, non trovando dove posare la pianta del piede, tornò a lui nell'arca, perché c'era ancora l'acqua su tutta la terra. Egli stese la mano, la prese e la fece rientrare presso di sé nell'arca. <sup>10</sup>Attese altri sette giorni e di nuovo fece uscire la colomba dall'arca <sup>11</sup>e la colomba tornò a lui sul far della sera; ecco, essa aveva nel becco un ramoscello di ulivo. Noè comprese che le acque si erano ritirate dalla terra. <sup>12</sup>Aspettò altri sette giorni, poi lasciò andare la colomba; essa non tornò più da lui. <sup>13</sup>L'anno seicento uno della vita di Noè, il primo mese, il primo giorno del mese, le acque si erano prosciugate sulla terra; Noè tolse la copertura dell'arca ed ecco la superficie del suolo era asciutta. <sup>14</sup>Nel secondo mese, il ventisette del mese, tutta la terra fu asciutta.

ebraico

## Le lac / La lago / Il lago

Henri Michaux



Belga naturalizzato francese nel 1955, Henri Michaux (nato a Namur nel 1899, morto nel 1984 a Parigi) è stato scrittore, poeta e pittore. C'è chi ha riscontrato nella sua opera, nonostante non abbia fatto mai parte del movimento, una inclinazione alla corrente surrealista. Il testo scelto, proposto da Joseph Van der Vleugel, è tratto da *La Nuit remue* (Gallimard, Paris 1935).

esperanto

Gedinne, Belgique : Le lac

Si près qu'ils approchent du lac, les hommes n'en deviennent pas pour ça grenouilles ou brochets.

Ils bâtissent leurs villas tout autour, se mettent à l'eau constamment, deviennent nudistes... N'importe. L'eau traîtresse et irrespirable à l'homme, fidèle et nourissante aux poissons, continue à traiter les hommes en hommes et les poissons en poissons. Et jusqu'à présent aucun sportif ne peut se vanter d'avoir été traité différemment.

Eĉ pli kaj pli apudstantaj lagon, homoj ne pro tio iĝos ranoj aŭ ezokoj.

Ili starigas iliajn vilaojn ĉirkaŭ ĝi, ĉiam baniĝas, iĝas nudistoj ... tute egale. Akvo perfida kaj ne spirebla por homoj, fidela kaj nutrориĉa por fiŝoj, traktadas homojn kiel homojn kaj fiŝojn kiel fiŝojn. Kaj ĝis nun, neniu sportisto kapablis fanfaroni pri malsimila traktado.

Per quanto si facciamo più e più vicini al lago, gli uomini non diventano per questo rane o lucci.

Costruiscono le loro ville tutto attorno, stanno sempre nell'acqua, diventano nudisti ... Non fa nulla. L'acqua infido e soffocante per l'uomo, fedele e nutriente per i pesci, continua a trattare gli uomini come uomini e i pesci come pesci. E finora nessuno sportivo può vantarsi di essere stato trattato in modo diverso.

## La pioggia nel pineto / Pluvo en pinejo (dispari)

Gabriele d'Annunzio

Ecco uno fra i testi più famosi del celebre d'Annunzio, poeta "vate" simbolo del Decadentismo italiano (di cui fu illustre rappresentante insieme al Pascoli), nella traduzione di Luigi Minnaja.

Jen unu el la plej konataj poemoj de la mondfama d'Annunzio, poeto "profeto" simbolo de la itala Dekadencismo (kies li estis kune kun Giovanni Pascoli), en la traduko de Luigi Minnaja.

Silentu. Ĉe la lim' arbara  
mi ne aŭdas viajn  
parolojn homajn;  
sed aŭdas parolojn  
pli novajn,  
kiujn diras gutoj kaj folioj  
malproksimaj.  
Aŭskultu. Pluvas  
de l' nuboj disaj.  
Pluvas sur tamariskojn  
solecajn kaj sekajn,  
pluvas sur pinojn  
skvamajn kaj hirtajn,  
pluvas sur mirtojn  
diajn,

Taci. Su le soglie  
del bosco non odo  
parole che dici  
umane; ma odo  
parole più nuove  
che parlano gocciole e foglie  
lontane.  
Ascolta. Piove  
dalle nuvole sparse.  
Piove su le tamerici  
salmastre ed arse,  
piove su i pini  
scagliosi ed irti,  
piove su i mirti  
divini,

La pioggia nel pineto.

Taci. Su le soglie  
del bosco non odo  
parole che dici  
umane; ma odo  
parole più nuove  
che parlano gocciole e foglie  
lontane.

Ascolta. Piove  
dalle nuvole sparse.  
Piove su le tamerici  
salmastre ed arse,  
piove su i pini  
scagliosi ed irti,

sur genistojn brilajn  
pro densa floraro,  
sur juniperojn riĉajn  
je beroj parfumaj,  
pluvas sur niajn vizaĝojn  
arbarajn.  
Pluvas sur niajn manojn  
nudajn,  
sur niajn vestojn  
malpezajn,  
sur la freŝajn pensojn,  
kiujn la nova animo  
malfermas,  
sur la fabelon belan,  
kiu vin iluziis hieraŭ  
kaj min iluzias hodiaŭ,  
ho Hermiono.

Ĉu vi aŭdas? Pluvo falas  
sur la solecan  
herbaron  
kun klakado varia  
en la aero  
laŭ la folioj  
pli disaj, malpli disaj.  
Aŭskultu. Respondas  
al ploro la kanto  
de la cikadoj,  
kiujn ne timigas  
la suda ploro,  
nek la griza ĉielo.  
Kaj pino  
havas sonon, mirto  
alian sonon, junipero  
alian malsaman, instrumentoj

su le ginestre fulgenti  
di fiori accolti,  
su i ginepri folti  
di coccole aulenti,  
piove su i nostri volti  
silvani,  
piove su le nostre mani  
ignude,  
su i nostri vestimenti  
leggieri,  
su i freschi pensieri  
che l'anima schiude  
novella,  
su la favola bella  
che ieri  
t'illuse, che oggi m'illude,  
o Ermione.

Odi? La pioggia cade  
su la solitaria  
verdura  
con un crepitio che dura  
e varia nell'aria  
secondo le fronde  
più rade, men rade.  
Ascolta. Risponde  
al pianto il canto  
delle cicale  
che il pianto australe  
non impaura,  
nè il ciel cinerino.  
E il pino  
ha un suono, e il mirto  
altro suono, e il ginepro  
altro ancóra, stromenti



diversaj  
sub sennombraj fingroj.  
Kaj enmergitaj  
ni estas en la spirito  
arbara,  
je planta vivo vivantaj;  
via vizaĝo ebria  
malsekas je pluvo  
kiel folio,  
kaj la hararo  
parfumas kiel  
la helaj genistoj,  
ho tera kreaĵo,  
nomata  
Hermiono.

Aŭskultu, aŭskultu. Agordo  
de la aeraj cikadoj  
iom post iom  
pli surdiĝas  
sub la ploro  
kreskanta,  
sed la kanto miksiĝas  
pli raŭka,  
kiu de tie sube supreniras  
de la malseka ombro fora.  
Pli surda, pli raŭka  
mallaŭtiĝas, malaperas.  
Nur unu noto  
plutremas, malaperas,  
resonas, tremas, malaperas.  
Ne aŭdiĝas voĉo de l' maro.  
Nun aŭdiĝas sur tuta foliaro  
plaŭdadi



diversi  
sotto innumerevoli dita.  
E immersi  
noi siamo nello spirito  
silvestre,  
d'arborea vita viventi;  
e il tuo volto ebro  
è molle di pioggia  
come una foglia,  
e le tue chiome  
auliscono come  
le chiare ginestre,  
o creatura terrestre  
che hai nome  
Ermione.

Ascolta, ascolta. L'accordo  
delle aeree cicale  
a poco a poco  
più sordo  
si fa sotto il pianto  
che cresce;  
ma un canto vi si mesce  
più roco  
che di laggiù sale,  
dall'umida ombra remota.  
Più sordo e più fioco  
s'allenta, si spegne.  
Sola una nota  
ancor trema, si spegne,  
risorge, trema, si spegne.  
Non s'ode voce del mare.  
Or s'ode su tutta la fronda  
crosciare

la pluvo argenta  
puriga,  
la plaŭdo varia  
laŭ la folioj  
pli densaj, malpli densaj.  
Aŭskultu.  
La filo de l'aero  
estas muta; sed la filo  
de l' slimo fore,  
la rano,  
kantas en ombro plej funda  
iuloke, iuloke!  
Kaj pluvas sur viajn okulharojn,  
Hermiono.

Pluvas sur viajn okulharojn nigrajn  
kvazaŭ vi plorus  
sed pro plezuro; ne blanka  
sed preskaŭ verdiĝinta  
ŝajnas al vi el ŝelo eliri,  
kaj tuta vivo en ni estas freŝa  
perfuma,  
la koro en la brusto estas kiel  
netuŝita persiko,  
kaj inter la palpebroj la okuloj  
estas kiel fontoj inter la herboj,  
la dentoj en la alveoloj  
estas kiel migdaloj nematuraj.  
Kaj ni iras de he ĝo al he ĝo,  
jen kune, jen ne  
(kaj la verda forto kruda  
kunligas niajn maleolojn,  
malhelpas niajn genuojn)  
iuloken, iuloken!



l'argentea pioggia  
che monda,  
il croscio che varia  
secondo la fronda  
più folta, men folta.  
Ascolta.  
La figlia dell'aria  
è muta; ma la figlia  
del limo lontana,  
la rana,  
canta nell'ombra più fonda,  
chi sa dove, chi sa dove!  
E piove su le tue ciglia,  
Ermione.

Piove su le tue ciglia nere  
Sì che par tu pianga

ma di piacere; non bianca  
ma quasi fatta virente,  
par da scorza tu esca.  
E tutta la vita è in noi fresca  
aulente,  
il cuor nel petto è come pesca  
intatta,  
tra le pàlpebre gli occhi  
son come polle tra l'erbe,  
i denti negli alvèoli  
con come mandorle acerbe.  
E andiam di fratta in fratta,  
or congiunti or disciolti  
(e il verde vigor rude  
ci allaccia i mallèoli  
c'intrica i ginocchi)  
chi sa dove, chi sa dove!



Kaj pluvas sur niajn vizaĝojn  
arbarajn,  
pluvas sur niajn manojn  
nudajn,  
sur niajn vestojn  
malpezajn,  
sur la freŝajn pensojn,  
kiujn la nova animo  
malfermas,  
sur la fabelon belan,  
kiu min iluziis hieraŭ  
kaj vin iluzias hodiaŭ,  
ho Hermiono.

E piove su i nostri vólti  
silvani,  
piove su le nostre mani  
ignude,  
su i nostri vestimenti  
leggieri,  
su i freschi pensieri  
che l'anima schiude  
novella,  
su la favola bella  
che ieri  
m'illuse, che oggi t'illude,  
o Ermione.

## Ráfi guoi'ka / Kvieta fluo / italiano

Paulus Utsi

Il norvegese Paulus Utsi (1918-1975) ha abitato soprattutto in Svezia. Allevatore di renne, educatore di *slöjd* e scrittore (fra le raccolte più significative *Giela giela*, 1974, e la postuma *Giela gielain*, 1980), le sue poesie sono piene di malinconia nostalgica per la sorte del popolo sameo, la cui cultura sarebbe minacciata dallo sviluppo tecnico ed economico, come ad esempio la costruzione di centrali idroelettriche, che sono state causa di grandi cambiamenti naturali. Per la traduzione (dal nordsameo, lingua parlata nelle regioni settentrionali di Svezia, Norvegia e Finlandia) si ringrazia Leif Nordenstorm, che ha esperantizzato il testo per la serata internazionale dell'88° Congresso Universale (Göteborg 2003).

La norvega Paulus Utsi (1918-1975) ĉefe loĝis en Svedio. Boacbredisto, slojdisto kaj verkisto (inter la ĉefaj poemaroj *Giela giela*, 1974, kaj la postmorta *Giela gielain*, 1980), liaj poemoj estas plenaj de nostalgia melankolio pri la sorto de la samea popolo, kies kulturon la teĥnika kaj ekonomia evoluo minacu, kiel ekzemple pro la konstruo de hidroelektraj centraloj, kiuj kaŭzis grandajn ŝanĝiĝojn en la naturo. Por la tradukaĵo (el la nordsamea, lingvo parolata en nordaj Svedio, Norvegio kaj Finnlando) oni dankas Leif Nordenstorm, kiu esperantigis ĝin (aliaj tekstoj legeblas ĉe: <http://www.everk.it/index.php?id=19,107,0,0,1,0>) por la nacia vespero de la 88-a UK (Gotenburgo 2003).

Várrečácci  
mii áv'dal læ ráfis gáll'gan  
gággu luon'do gæinos ad'dán  
Stoakkan ædnama čab'budagain  
njuikudan gedhgiid baddjel  
vuoŋnasteddjet gås čákket  
Du gáll'gagnæi'dno læ čad'nun  
Ja du luondo vájaldus  
Du juoi'gamuš ii šat gul'lu  
ii-ge bieĝ'ga du jiena suonain lávlut  
Álmuš læ du čadnan  
ja dæd'dán buolvaid ala  
sil'basuodna  
hættejiedna skáddjá vári vuos'tá  
sil'basuodna

Montoakvo  
pace fluinta  
kie naturo faris vojon  
Vi ludis kun la belec' de la ter'  
saltis sur ŝtonoj  
ripozis kie estis loko  
Via vojo ligiĝis  
kaj via vagado ennaturo  
Via kanto ne plu aŭdiĝas  
la vento ne plu sonorigas viajn voĉkordojn  
La homo ligis vin  
kaj genuigis vin  
ho arĝenta kordo  
helpokrio sonas kontraŭ la monto  
ho arĝenta kordo

Acqua di monte  
che scorreva pacifica  
dove la natura faceva una via  
Hai giocato con la bellezza della terra  
saltato su pietre  
riposato dove c'era spazio  
Il tuo cammino è coatto  
come il tuo errare nella natura  
Non più si ode il tuo canto  
il vento non suona più le corde della tua voce  
L'uomo ti ha legato  
e ti ha messo in ginocchio,  
corda d'argento,  
un grido d'aiuto risuona contro il monte,  
corda d'argento

## Tala / La fontano / La fontana

Si Mohand ou-Mhand n At Hmadouch

Esperantigita de Renato Corsetti, la ĉi-sekva ŝerca poemo (en la berbera) – verko de la plej konata **maziĥa** vaganta poem-verkisto, Si Muhand, kiu vivis en la dua duono de la 19-a jarcento (Icheriwen, 1848 c.a – Lhammam-Michelet, 28.12.1905) – emfazas la gravecon de la fontano, ĉefa loko de socialigo por la virinoj. La fontano por ĉerpi akvon en ĉiu vilaĝo de Kabilujo, la berbera/maziĥa regiono de Alĝerio, estis la renkontiĝopunkto por la virinoj de la vilaĝo: la kutimo malpermesis al viroj iri al tiuj fontanoj, kie nur kolektiĝis virinoj.



Tradotta in esperanto da Renato Corsetti, l'arguta poesia proposta (originale in lingua berbera) – opera del più famoso autore girovago ....., Si Muhand, vissuto nella seconda metà del sec. XIX (Icheriwen, 1848 circa – Lhammam-Michelet, 28 dicembre 1905) – sottolinea l'importanza della fontana, principale luogo di socializzazione delle donne. La fontana per prendere acqua in ogni villaggio della Cabilia, la regione berbera dell'Algeria, era il luogo d'incontro per le donne del villaggio: la tradizione vietava agli uomini di andare a queste fontane, attorno alle quali solo le donne si raccoglievano.

Sebĥan Rebbi k-ihubben  
Ay-adraĥ nejren  
Rrank d-amnaĥ I tala.

Ay terzrid deg mecacen  
Widak melulen  
Tiĥdayin sut rruĥa.

Wellah a lukan d bnaĥem  
Ur k-xdinem akken  
Ad-a k-nfun si tmurta.

Do, Dio farigis vin tre elita,  
Ho vi, ŝtono enĉizita,  
ŝtona sid-loko ĉe nia fontano.

Por vi virina kruraro ekscita  
estis multfoje vidita  
de junulinoj en sia sutano.

Se ne ŝtono estus sed viro sprita,  
vi ne estus dorlotita,  
ekzilita estus vi al savano.

Dunque, Dio ti ha fatto molto elitaria,  
tu, pietra scolpita,  
sedile in pietra presso la nostra fontana.

Per voi donne kruraro emozionante  
è stato più volte visto  
da giovani donne nella loro gonna.

Se non pietra fossi ma un uomo geniale,  
non saresti l'imbarazzo,  
esiliata saresti alla savana.

